

Johann Wolfgang von Goethe, Knab' rozeton vidis li	Johann Wolfgang von Goethe, La rozeto	Johann Wolfgang von Goethe, Roz' sur erikejo	Johann Wolfgang von Goethe, Dornrozeto
<i>tradukita de Joachim Gießner</i>	<i>tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof</i>	<i>tradukita de Konrad Matheus</i>	<i>tradukita de Kálmán Kalocsay</i>
Knab' rozeton vidis li; erikeja floro. Juna, bela estis ĝi. Por admiri kuris li ĝoje kun adoro. Rozo, rozo, ruĝa roz', erikeja floro.	Knabo vidis – jen rozeto Sur la kampo staras; Bela, juna la floreto . . . Vive kuras la knabeto, Ĝojas, miras, flaras. Sur la kampo la rozet' Kiel infanet'.	Vidiĝis eta ruĝa roz' de knab', sur erikejo. Ĝi belis en matena ros'. Hastis li al juna ŝos' admiri ĝin kun ĝojego. Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz', roz' sur erikejo.	Vidis knab': Jen, juna flor'! Rozujet' kampara! Bela, kiel la aŭror'! Li alkuris ĝoje por Vidi, kiel kara! Rozo, rozo, ruĝa roz', Rozujet' kampara.
Diris knab': „Mi rompos vin, vi rozeta floro“. Diris roz': „Mi pikos vin, ke vi ne forgesos min, premas min doloro.“ Rozo, rozo, ruĝa roz', erikeja floro.	Knabo diris : « mi el-tiros Belulinon mian »; Floro diris : « vi foriros, – Per pikiloj mi disŝiros Tuj la manon vian ». Sur la kampo la rozet' Kiel infanet'.	Diris knab': “Mi rompos vin, rozo sur erikejo.” Diris roz': “Dorn' pikos vin, por ke vi ne forgesu min. Al mi ne estu sufero. Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz', roz' sur erikejo.	Diris knab': Mi volas vin, Rozujet' kampara. Diris roz': Mi boras vin, Ĉiam vi memoras min, Pro l' dolor' amara. Rozo, rozo, ruĝa roz', Rozujet' kampara.
Knab' sovaĝa rompĝin; erikeja floro. Rozo ja defendis sin kaj sufere pikis lin, ne utilis ploro. Rozo, rozo, ruĝa roz', erikeja floro.	La sovaĝa knab' ridante La rozeton prenis, – La floreto batalante Sin defendis pikadante, Sed la sorto venis. Sur la kampo la rozet' Kiel infanet'.	Kaj knab' sovaĝa rompĝin, rozon sur erikejo. En defend' roz' pikis lin. Sed ve' kaj aĥ' ne helpis ĝin. Venis sort' sen tolero. Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz', roz' sur erikejo.	Knabo rozon ŝiris do De l' rozuĝ' kampara, Ĝi, defende, pikis trol! Sed ne helpis ve kaj ho Kontraŭ vol' barbara. Rozo, rozo, ruĝa roz', Rozujet' kampara.
...

*Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 - †2003-11-25).*

Arg-1022-2225 (2014-12-16 16:29:14)

Tiu ĉi kanto-traduko troviĝas en <http://arkivo.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.

*Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, *1859-12-15 - †1917-04-14).*

Arg-1022-2070 (2014-05-23 12:25:14)

Tiu ĉi Zamenhofa poem-traduko troviĝas en <http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lern/librejo/0012/0008.php>.

*Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de Konrad Matheus.*

Arg-1022-2227 (2014-12-17 13:24:53)

S-ano Konrad Matheus loĝas en Mühlenweg 20, D-33038 Nieheim, Germanio.

*Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, *1911 - †1976).*

Arg-1022-2226 (2014-12-16 16:56:40)

Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas interalie en <http://egalite.hu/kalocsay/eterna/dornrozeto.htm>.